



# MANILA DEKLARACIO PRI MONDA TURISMO

Akceptita de la Monda Turisma Konferenco  
okazinta en Manilo, Filipinoj,  
de la 27a de septembro ĝis la 10a de oktobro 1980



## TURISMA ĈARTO DE RAJTOJ



## TURISMA KODO



BIBLIOTHÈQUE  
ESP.P. 2498  
La Chaux-de-Fonds

"MONDA TURISMO" 1986

# MANILA DEKLARACIO PRI MONDA TURISMO

## PARTO A

**Akceptita de la Monda Turisma Konferenco  
okazinta en Manilo, Filipinoj,  
de la 27a de septembro ĝis la 10a de oktobro 1980**

### *La Monda Turisma Konferenco*

**Okazinte en Manilo, Filipinoj, de la 27a de septembro ĝis la 10a de oktobro 1980, kunvokita de la Monda Turisma Organizo kaj partoprenita de 107 ŝtataj delegacioj kaj 91 delegitaroj de observantoj, por klarigi la realan naturon de la turismo en ĉiuj siaj rilatoj kaj la rolon, kiun la turismo devas ludi en dinamika kaj profunde ŝanĝiĝanta mondo, kaj ankaŭ por ekzameni la respondecon de la ŝtatoj pri la evoluigo kaj antaŭenigo de la turismo en la nuntempaj socioj kiel pli ol nura ekonomia agado de nacioj kaj popoloj,**

**Konsiderante, ke la monda turismo povas evolui en kondiĉoj de paco kaj sekureco, kiuj povas esti atingitaj per komunaj fortostreĉoj de ĉiuj ŝtatoj por malpliigi la internacian streĉiĝon kaj evoluigi internacian kunlaboron en spirito de amikeco, respekto de homaj rajtoj kaj interkompreniĝo inter ĉiuj ŝtatoj,**

**Konvinkiĝinte, ke la monda turismo povas esti viviga forto por la monda paco kaj povas provizi moralan kaj intelektan bazon por internaciaj kompreniĝo kaj interdependeco,**

**Konvinkiĝinte plue, ke la monda turismo povas kontribui al la estigo de nova internacia ekonomia ordo, kiu helpas elimini la plilarĝiĝantan ekonomian breĉon inter la evoluintaj kaj evoluantaj landoj kaj certigi daŭran akcelon de ekonomia kaj socia evoluo kaj progreso, precipe en la evoluantaj landoj,**

**Konsciante pri tio, ke la monda turismo povas prosperi nur se ĝi baziĝas sur la justeco, la suverena egaleco, la neentruziĝo en internajn aferojn kaj la kunlaboro inter ĉiuj ŝtatoj, sendepende de iliaj ekonomiaj kaj sociaj sistemoj, kaj se ĝia fina celo estas la plibonigo de la vivkvalito kaj la kreado de pli bonaj vivkondiĉoj por ĉiuj popoloj, konforme al la postuloj de la homa digno,**

**Interkonsentas, en tiu spirito, deklari la sekvan:**

**1. La turismo estas konsiderata agado bezona por la vivo de nacioj pro sia senpera efiko sur la socia, kultura, eduka kaj ekonomia sferoj de la naciaj socioj kaj iliaj internaciaj rilatoj. Ĝia evoluo estas ligita kun la**



socia kaj ekonomia evoluo de la nacioj kaj povas esti ebla nur, se la homoj havas eblon por krea ripozo kaj ferioj kaj ĝuas la liberon vojaĝi enkadre de la libertempo kaj ripozo, kies profunde homa karaktero estas substrekita. Ĝia ekzisto mem kaj ĝia evoluo dependas komplete de la ekzisto de stato de daŭra paco, al kiu devas kontribui ankaŭ la turismo.

2 Sur la sojlo de la dudek unua jarcento kaj konsidere la problemojn, frontantajn la homaron, ŝajnas eble kaj necese analizi la fenomenon de turismo, fundamente rilate al la amplekso, kiun ĝi atingis de post la rajtigo de laboristoj al ĉiujaraj pagitaj ferioj transformis la turismon el limigita elitisma distro en agadon pli vastan, integritan en la ĝeneralan socian kaj ekonomian vivon.

3. La aspiroj de la koncernaj popoloj pri la turismo, la iniciatoj de la Ŝtatoj koncerne la leĝofaradon kaj instituciojn, la konstantaj agadoj de libervolaj unuiĝoj, reprezentantaj la diversajn tavolojn de la loĝantaro, kaj la teknika kontribuo flanke de specialistoj donis al la nuntempa turismo gravan lokon inter la homaj agadoj. La Ŝtatoj rekonis tiun ĉi fakton kaj ilia granda plimulto konfidis al la Monda Turisma Organizo certigi la harmonian kaj daŭran evoluon de la turismo, kunlabore en konvenaj kazoj kun la Specialaj Agentejoj de Unuiĝintaj Nacioj kaj aliaj koncernaj internaciaj organizoj.

4. La rajto utiligi libertempon inkluzivanta la rajton pri ferioj, pri la libero de vojaĝado kaj turismo, tiu natura konsekvenco de la rajto labori, estas rekonita de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj kaj ankaŭ de la leĝaroj de pluraj Ŝtatoj kiel elemento de la homa totaleco. Ĝi implicas por la socio la devon krei por la civitanoj la plej bonajn praktikajn, efikajn kaj sendiskriminaciajn eblojn al tiaspeca agado. Tiaj klopodoj devas harmonii kun la prioritatoj, institucioj kaj tradicioj de ĉiu aparta Ŝtato.

5. Ekzistas multaj malhelpoj por la evoluo de la turismo. La nacioj kaj grupoj de nacioj devas determini kaj studi tiujn ĉi malhelpojn kaj utiligi rimedojn, celantajn la malpliigon de ilia negativa influo.

6. La parto, kiun la turismo konsistigas en la naciaj ekonomioj kaj en la internacia komerco, faras ĝin grava faktoro en la evoluo de la mondo. Ĝia konstanta granda rolo en la nacia ekonomia agado, internaciaj negocoj kaj en la certigado de la ekvilibro de la bilanco faras ĝin unu el la ĉefaj branĉoj de la monda ekonomio.

7. En ĉiu lando la enlanda turismo kontribuas al la plibonigo de la bilanco de la nacia ekonomio per redistribuo de la nacia enspezo. La enlanda turismo plialtigas la konsciiĝon pri la komuneco de intereso kaj kontribuas al la evoluo de agadoj favoraj por la ĝenerala ekonomio de la lando. Tiel la evoluigo de la turismo, venanta el eksterlando, devas esti akompanata per simila strebado por plivastigi la enlandan turismon.



8. Tamen la ekonomia gajno de la turismo, kiom ajn reala kaj grava ĝi estu, ne estas kaj ne povas esti la sola kriterio por la decido flanke de Ŝtatoj instigi tiun ĉi agadon. La rajto ferii, la eblo por la civitano ekkoni la propran ĉirkaŭaĵon, pli profunda konsciigo pri la nacia identeco kaj pri la solidareco, liganta al la samlandanoj kaj la sento pri aparteno al iu kulturó kaj iu popolo estas gravegaj kialoj por stimuli la partoprenon de la individuo en la enlanda kaj internacia turismoj per eblo pri ferioj kaj pri vojaĝado.

9. La graveco, kiun milionoj da niaj samtempuloj atribuas al la turismo en la utiligo de sia libertempo kaj en sia koncepto pri la vivkvalito, necesigas, ke la registaroj kalkulu pri ĝi kaj apogu ĝin.

10. Socia turismo estas celo, kiun la socio devas sekvi en la intereso de tiuj civitanoj, kiuj estas la plej malprivilegiataj en la utiligo de la rajto pri ripozo.

11. Per siaj efikoj sur la fizika kaj mensa sano de la individuoj, praktikantaj ĝin, la turismo estas faktoro de la socia ekvilibro, de la plialtigo de la laborkapablo de kolektivoj homaj kaj de la individua kaj kolektiva bonfarto.

12. Per la amplekso de la servoj necesaj por kontentigi ĝiajn postulojn, la turismo kreas novajn agadojn, konsiderinde gravajn, kiuj estas fonto de estigo de novaj dungebloj. Ĉi-rilate la turismo estas pozitiva elemento de la socia evoluo en ĉiuj landoj, kie ĝi estas praktikata, sendepende de ilia evoluinteco.

13. Enkadre de la internaciaj rilatoj kaj la serĉado de paco, baziĝanta sur justeco kaj respekto de la individuaj kaj naciaj aspiroj, la turismo aperas kiel pozitiva kaj ĉiama faktoro por la antaŭenigo de reciprokaj konatiĝo kaj kompreniĝo kaj kiel bazo por atingi pli da respekto kaj konfido inter ĉiuj popoloj de la mondo.

14. La nuntempa turismo rezultas el la praktikado de socialpolitiko, kiu kondukis al la akiro de ĉiujaraj pagataj ferioj por la laboristoj kaj samtepe reprezentas la rekonon pri fundamenta rajto de la homo pri ripozo kaj ferioj. Ĝi fariĝis faktoro de socia stabileco, reciproka kompreniĝo inter individua evoluo. Krom siaj bone konataj ekonomiaj aspektoj, ĝi akiris tiujn kulturajn kaj moralajn mezurojn, kiuj devas esti favorataj kaj protektataj kontraŭ la damaĝaj deformiĝoj, kiujn povas kaŭzi ekonomiaj faktoroj. La publikaj aŭtoritatoj kaj la turismaj specialistoj devas konforme al tio partopreni la evoluigon de la turismo kaj formuli la gvidliniojn, celantajn la instigadon de la necesaj investadoj.

15. La junulara turismo postulas la plej aktivan atenton, ĉar gejunuloj havas malpli da enspezoj, uzeblaj por vojaĝado kaj feriado, ol aliaj



tavoloj de la loĝantaro. Pozitiva politiko devas provizi la junularon per kiel eble plej granda kuraĝigo kaj maksimumaj rimedoj. La sama atento devas esti certigata por la maljunuloj kaj la handikapuloj.

16. En la universalaj strebadoj establi novan internacian ekonomian ordon la turismo povas, en konvenaj kondiĉoj, ludi pozitivan rolon en la antaŭenigo de stabileco, kunlaboro, interkompreniĝo kaj solidareco inter ĉiuj landoj.

17. La nacioj devus plibonigi la laborkondiĉojn de turismaj laboristoj kaj konfirmi kaj protekti ilian rajton establi profesiajn sindikatojn kaj interkonsenti kolektive.

18. La turismaj havaĵoj disponeblaj en la diversaj landoj konsistas samtempe el spaco, instalaĵoj kaj valoroj. Tiuj ĉi havaĵoj ne povas esti lasitaj senkontrole sen riski ilian damaĝon aŭ eĉ detruon. La kontentigo de la postuloj de la turismo ne devas malutili al la sociaj kaj ekonomiaj intereso de la loĝantaro en la turismaj regionoj, al la medio aŭ — antaŭ ĉio — al la naturaj riĉaĵoj, kiuj estas fundamentaj por la turistoj, kaj al historiaj kaj kulturaj vidindaĵoj. Ĉiuj turismaj havaĵoj estas parto de la heredaĵo de la homaro. La naciaj komunumoj kaj la tuta internacia komunumo devas fari la necesajn paŝojn por konservi ilin. La konservado de historiaj, kulturaj kaj religiaj vidindaĵoj ĉiam — kaj precipe dum konfliktoj — reprezentas unu el la fundamentaj respondecoj de la Ŝtatoj.

19. La internacia kunlaboro en la kampo de la turismo estas entrepreno, kie la karakterizaĵoj de la popoloj kaj la bazaj intereso de individuaj Ŝtatoj devas esti respektataj. Sur ĉi tiu tereno la centra kaj decidiga rolo de la Monda Turisma Organizo kiel koncepto-faranta kaj harmoniiganta elemento estas evidenta.

20. La duflankaj kaj multflankaj teknikaj kaj financaj kunlaboroj ne povas esti konsiderataj evoluhelpo, ĉar ili konsistigas la komunigon de rimedoj, necesaj por la utiligo de la valoroj avantaĝe por ĉiuj flankoj.

21. En la turisma praktiko la spiritaĵoj devas superi la teknikajn kaj materiajn. La spiritaĵoj estas esence la sekvaĵoj:

a) atingi la plenan maturiĝon de la persono,

b) senĉese kontribui al edukado,

c) agnoski la sortan egalecon de la popoloj,

d) liberigi la homon en spirito de respekto por lia personeco kaj digno,

e) rekoni la originalecon de la kulturoj kaj respekti la moralan heredaĵon de la popoloj.

22. La preparado por la turismo devas esti integrita kun la edukado de la civitano pri liaj civitaj respondecoj. Ĉi-rilate la registaroj devas mobilizi la disponeblajn edukajn kaj informadajn rimedojn kaj faciligi la laboron de individuoj kaj organizoj, okupiĝantaj pri tiu ĉi agado. La preparado por turismo, por ferioj kaj por vojaĝado povus utile formi parton de la spirita kaj korpa edukado de la junularo. Pro tio la integriĝo de la turismo en la edukadon de la junularo prezentas bazan elementon favoran al la daŭra plifortigo de la paco.

23. Ĉia longperioda analizo de la socia, kultura kaj ekonomia evoluoj de la homaro devas konsideri la naciajn kaj internaciajn agadojn pri turismo kaj libertempo. Ĉi tiuj agadoj nun formas integran parton en la vivo de modernaj naciaj kaj internaciaj socioj. Konsciaj pri la agnoskitaj valoroj de turismo, kiuj estas nedisigeblaj de ĝi, la aŭtoritatoj devas dediĉi pliigantan atenton al la evoluigo de naciaj kaj internaciaj turismaj kaj libertempaj agadoj, baziĝantaj sin sur ĉiam plilarĝiĝanta partopreno de homoj en ferioj kaj vojaĝoj kaj ankaŭ sur la moviĝo de personoj pro multaj aliaj kialoj, cele al la certigo de orda kresko de la turismo harmonie kun la aliaj bezonoj de la socio.

24. La Ŝtatoj kaj aliaj partoprenantoj de la Konferenco, kune kun la Monda Turisma Organizo, estas forte alvokataj konsideri la orientiĝojn, vidpunktojn kaj rekomendojn donitajn de la Konferenco, por ke ili povu kontribui, surbaze de siaj spertoj kaj kunlige al siaj ĉiutagaj agadoj, al la praktika evoluo de la monda turismo kaj doni al ĝi novan impulson.

25. La Konferenco alvokas la Mondan Turisman Organizon fari ĝion necesan, pere de ĝia interna mekanismo kaj, kie tio konvenas, kunlabore kun aliaj internaciaj, inter-registaraj kaj ne-registaraj organizoj, por ebligi la tutmondan efektivigon de la principoj, konceptoj kaj orientiĝoj, enstantaj en tiu ĉi fina dokumento.

## PARTO B

### *La Monda Turisma Konferenco.*

kunvokita de la Monda Turisma Organizo en Manila de la 27a de septembro ĝis la 10a de oktobro 1980, por pritrakti temojn, koncernantajn kaj la publikan kaj la privatan sektorojn, kaj tiujn bezonantajn tujan atenton en la intereso de la harmonia evoluo flanke de la turismo.



## **Interkonsentis pri la sekvoj:**

### **PLIBONIGI LA OFERTADON**

Ekzameninte la dokumenton CMT/DB/13 titolitan "Plibonigi la ofertadon", prezentitan de la Ĝenerala Sekretario, kaj la dokumentojn CMT/CP/13, prezentitajn de la partoprenantoj,

Konstatas la sekvan:

1. La turisma oferto de ajna lando ne ekzistas izolite, sed ĝi ligiĝas al ĉiuj aliaj sektoroj de la nacia vivo.
2. La naciaj strategioj pri turisma ofertado devas kalkuli pri tiuj de la lokaj kaj regionaj komunumoj.
3. Plibonigi la kvaliton de la oferto, kio postulas ankaŭ respekton al la konsumanto, estas celo, pri kiu oni devas ĉiam zorgi; tio signifas ne nur tion, ke devas ekzisti luksaj servoj, sed ankaŭ tion, ke la servoj kaj faciligoj devas esti zorge planataj por certigi la alireblon fare de pli larĝaj tavoloj de la loĝantaro al la turismo kaj nacia kaj internacia, kaj samtempe konservi — se ne plibonigi — la kvaliton de la faciligoj.
4. La evoluigo de homaj faktoroj per edukado kaj informado estas necesa por plibonigi la kvaliton de ĉiuj turismaj projektoj.
5. La gvidantaroj en la unuopaj landoj kaj turismaj organizoj havas grandan respondecon koncerne la aŭtentikecon de la vidindaĵoj kaj produktaĵoj turismaj kaj la provizadon kaj disvastigadon pere de la amas-komunikiloj de objektivaj, precizaj kaj ampleksaj informoj pri ĉiuj disponeblaj faciligoj, precipe kaze de novaj vojaĝceloj.
6. En la epoko, kiam la ŝtatoj formulas novan politikon pri energimastromado, devas esti taŭge emfazataj la avantaĝoj, rezultantaj el la turismo, por ke la turisma ofertado estu traktata sur bazo egalrange kun la aliaj sektoroj kaj kiel parto de la naciaj prioritatoj.
7. La politiko pri turisma planado devas esti formulata sur la loka, regiona aŭ nacia nivelo enkadre de la nacia planado; tiu planado devas esti taksata periode, kaj kvante kaj kvalite.
8. La preciza analizo de turismaj tendencoj kaj la determinado de la bezonoj koncerne la turisman ofertadon dependas de ekuzo de ĝenerale akceptitaj normoj pri la kolektado de statistikoj pri la enlanda kaj internacia turismo.
9. La evoluigo de la turisma oferto necesigas pli grandajn fortostreĉojn



por interkompreniĝo, kunlaboro kaj kunordigado inter la publika, privata kaj la socia sektoroj kaj ankaŭ inter la diversaj landoj.

10. La evoluo de la turismo kaj naci- kaj internaci-skale povas kontribui pozitive al la vivo de nacioj, se la oferto estas bone planata kaj altkvalita, protektanta kaj respektanta la kulturen heredaĵon, la valorojn de la turismo kaj la naturan, socian kaj homan mediojn.

*Sekve de la supre menciitaj:*

Deziras, ke la konsultiĝoj kaj opini- kaj spert-interŝanĝoj okazu inter evoluantaj kaj industriigitaj landoj por establi favoran interdependecon kaj malpliigi ajnan ekscesan dependecon de transnaciaj entreprenoj en la evoluigo de la turismo;

Esprimas sian konvinkon, ke pli granda normigo de la karakterizaĵoj de la turisma oferto ebligas adapti la kostojn de konstruado kaj prizorgado de instalaĵoj al la realaj bezonoj;

Emfazas la gravecon certigi pli bonan utiligon de la ofertaĵoj, per la alpreno flanke de Ŝtatoj kaj turismaj funkciuloj de planoj por distribui feriotagojn, protekti la konsumanton kaj akceli la enlandan turismon;

Instigas, ke la registaroj akceptu kaj apliku normojn kaj metodikojn ĝenerale rekonatajn por kolekti internaciajn kaj enlandajn turismajn statistikojn kaj invitas la Mondan Turisman Organizon, kiel centran agentejon ĉi-kampan pliigi la strebadojn por harmoniigi kaj komparebligi la turismajn statistikojn pere de plivastigo de ĝiaj programoj pri komisioj kaj agadoj, per la plifortigo de ĝiaj kapabloj en la aplikado de internacie akceptitaj statistikaj normoj kaj metodikoj kaj pere de aliaj konvenaj rimedoj;

Deziras, ke estu certigataj por la malgrandaj kaj mezgrandaj entreprenoj la plej bonaj kondiĉoj, por ke tiuj povu ludi sian nemalhaveblan rolon en la evoluigo kaj diversigo de la turisma ofertado; kaj

Rekomendas studi novajn formojn de la turisma ofertado, adaptitajn al la estontaj internaciaj kaj enlandaj postuloj, por ebligi interalie la utiligadon de malmultekostaj lokaj rezervoĵoj kaj konstru-teknikoj, kiujn eblas harmonie integri al la loka ĉirkaŭaĵo;

Alvokas pliigi la fortostreĉojn por eviti la troŝarĝadon de la turismaj instalaĵoj, konservi kaj evoluigi la artan kaj naturan heredaĵon de regnoj, antaŭenigi la edukan valoron de la turismo kaj protekti la speciojn de faŭno kaj flaŭro en la intereso de la estontaj generacioj.

## TEKNOLOGIA KUNLABORO

Ekzameninte la dokumenton CMT/DB/14 pri "Teknologia Kunlaboro sur la Tereno de la Turismo", prezentitan de la Ĝenerala Sekretario, kaj la dokumentojn CMT/CP/14, prezentitajn de la partoprenantoj,

**Konstatas la sekvajn:**

1. Teknologia kunlaboro sur la turisma kampo celas malaltigi la kostojn de la produktado de turismaj servoj, altigi ilian kvaliton, plifortigi bazajn strukturojn kaj antaŭenigi la teknologian aŭtonomecon.
2. Tial ĝi kreskigas la kontribuon de la turisma agado al la evoluprocezoj.
3. Adekvata kaj justa teknologia kunlaboro evitas la ripetigon de la mekanismoj de sub-evoluinteco, la malekvilibron de enspezoj kaj la dependecon.
4. La transigo de la teknologio devas esti tiel planite, ke ĝi estu asimilata de la ricevaj landoj sen kaŭzi rompon inter la tradicio kaj la modernigo.
5. La transigo de la teknologio povas malutili aŭ malatingi la deziratajn celojn, se ĝi ne estas farata laŭ la necesaj kondiĉoj kaj en homa medio taŭga por ĝin ricevi kaj asimili; la Ŝtatoj devas zorge strebadi al tio, ke estu certigataj por ĉiuj teknologio-transigoj tiaj prepar-kondiĉoj, kiaj estas bezonataj por iliaj akceptoj en la homa medio.

*Sekve de la supre menciitaj:*

Deziras, ke la Ŝtatoj, kiam ili elektas teknologiojn sur la kampo de la turismo, konsciu pri la bezono adapti ilin al la lokaj cirkonstancoj; pri la graveco harmoniigi la diversajn lokajn kaj fremdajn teknologiojn; pri la neceso bazigi tiaspecajn teknologiojn sur elprovitaj, aplikataj teknikoj; kaj pri la dinamikeco de la rapida teknika evoluo;

Emfazas la gravecon por evoluantaj landoj apogi sin sur la homaj kaj aliaj rimedoj, haveblaj en siaj propraj landoj, por plifaciligi la transigon kaj sorbon de la teknologio enkadre de tutmonda evoluiga strategio;

Substrekas la decidan rolon, ludatan de la faka edukado kaj en la plibonigo de kvalito kaj en la pliiigo de fakuloj sur la kampo de teknologia kunlaboro en la turismo;

**Petas la Ŝtatojn apogi sin en la konvena momento sur la "Internacia Kodo por la Transigo de Teknologio" enkadre de sia teknologia kunlaboro por la turismo;**

**Insistas, ke la Monda Turisma Organizo daŭrigu siajn strebadojn por plifaciligi la interŝanĝon de informoj turismaj kaj teknikaj, precipe per ekzamenado de la eblo starigi tutmondan sistemon pri la turisma informado, kaj samteme eviti la malŝparan disipon kaj nenecesan duobligon de fortostreĉoj, por kreskigi la ag- kaj organizeblojn de unuopaj regnoj, precipe de la evoluantaj landoj, kaj tiamaniere plifortigi ilian teknologian aŭtonomecon en konvenaj kazoj per rimedoj de progresintaj teknologioj, kiel ekzemple la teleprilaborado de informoj;**

**Deziras, ke la teknologia kunlaboro inter registaroj, entreprenoj kaj asocioj en la evoluantaj kaj evoluintaj landoj esti intensigata, precipe per komunaj duflankaj kaj multflankaj projektoj;**

**Deziras, ke la transigo kaj aplikado de teknologioj estu grava elemento en ĉiuj turismaj kunlaboro kaj investo-projektoj;**

**Deziras, ke la Monda Turisma Organizo daŭre donu altan prioritaton al siaj agadoj ĉi-kampe, kiel unu el la institucioj, plenumantaj la Evoluigan Programon de la Unuiĝintaj Nacioj.**

### **HOMAJ RIMEDOJ**

**Ekzameninte la dokumenton CMT/DB/15 pri "La evoluigo de la Homaj Rimedoj", prezentitan de la Ĝenerala Sekretario, kaj la dokumentojn CMT/CP/15, prezentitajn de la partoprenantoj,**

**Konstatas la sekvajn:**

- 1. La faka edukado kaj la daŭra ĝisdatigo de la teknika kompetenteco sur la kampo de la turismo estas gravegaj ne nur por la ricevanto, sed ankaŭ por la socio ĝenerale.**
- 2. La profesia kompetento dependas ĉefe de la kvalito de la baza ĝenerala kaj ankaŭ teknika edukado, enlanda kaj eksterlanda, kaj de la malfermiteco al la spert-interŝanĝoj inter la nacioj.**
- 3. En la planado de turisma evoluigo, la edukado de kvalifikotaj homaj rezervoj devas ligiĝi kun la turisma procezo.**
- 4. La turismo estas unu el la agadoj, kie la homo troviĝas en la centro de la evoluiga procezo.**



5. La kvalito de la turisma produkto estas decida faktoro en la determinado de la turisma reputacio de iu ajn lando.

6. La problemoj de faka edukado kaj en la evoluantaj kaj en la evoluantaj landoj estas gravegaj por la turisma evoluo en la koncernaj landoj.

7. La politiko por evoluigi la homajn rimedojn ne povas realiĝi nur surbaze de ekonomiaj kriterioj kaj kontentigi la bezonojn de la faka edukado, sed devas ankaŭ konsideri la sociajn aspektojn de la turisma agado, kaj precipe la antaŭenigon de la totaliĝo de la homo kiel socio kaj lian individuan kontentigon spiritan, moralan kaj ankaŭ materian.

*Sekve de la supre menciitaj:*

Insistas pri la graveco de intergrigita planado en la edukado de la homfortoj;

Deziras, ke estu farita ĉio ebla por plialtigi la reputacion de la turismaj profesioj kaj la rangon de iliaj praktikantoj;

Deziras, ke la industriigitaj kaj evoluantaj landoj enkadre de la Monda Turisma Organizo, kune studu sur regiona bazo kaj, kie tio eblas, kunlabore kun aliaj koncernaj internaciaj organizoj, la problemojn de manko de instruistoj, de sufiĉnombra dungo de lokaj kadruloj kaj de la elmigrado de kvalifikitaj funkciuloj;

Notas kun kontento la decidojn, akceptitajn de la Monda Turisma Organizo cele al regionigo de ĝiaj fak-edukaj rimedoj kaj deziras, ke la kreado de tiaj rimedoj estu akcelataj;

Deziras, ke estu daŭrigataj la strebadoj antaŭenigi la turisman konscion cele al plifaciligado kaj plifavorigo de la komunikado inter la vizitantoj, la loĝantoj de la turist-akceptataj lokoj kaj la turismaj funkciuloj;

Substrekas ĉi-rilate la gravecon de la scio de lingvoj, precipe de tiuj kun universala destino, kia estas Esperanto;

Deziras, ke la internaciaj kaj regionaj financaj institucioj pli aktive partoprenu en la fak-edukaj projektoj, kaj precipe en la establado de instru-centroj en la evoluantaj landoj;

Deziras, ke la Monda Turisma Organizo determinu novajn celojn koncerne la fakan edukadon por ebligi la adekvatan kontentigon de estontaj bezonoj de la turisma sektoro;

Notas kontente la gravecon, donitan de la Membroj de la Monda Turisma Organizo, al la turisma faka edukado kaj la strebojn de la

Organizo por garantii la pluan edukadon de funkciuloj, precipe en la evoluantaj landoj, kaj specife en la formo de teknikaj kunvenoj, studcikloj kaj korespondaj kursoj, organizataj per ĝia Internacia Centro por Progresintaj Turismaj Studoj (ICPTS) en Meksikio;

Deziras, ke la Monda Turisma Organizo daŭre certigu plene sian fundamentan rolon kaj aparte siajn respondecojn koncerne la fakan edukadon por la turismo, kiel unu el la institucioj, plenumantaj la Evoluigan Programon de la Unuiĝintaj Nacioj.

## LIBERO DE MOVIĜO

Ekzameninte la dokumenton CMT/DB/16 pri "Celoj koncerne la Liberon de Moviĝo", prezentitan de la Ĝenerala Sekretario, kaj la dokumentojn CMT/CP/16, prezentitajn de la partoprenantoj,

Konstatas la sekvajn:

1. La libereco de moviĝo, kiu estas esprimita en la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj, la Internacia Konvencio pri Civilaj kaj Politikaj Rajtoj de 1966 kaj la Fina Akto de la Konferenco pri Sekureco kaj Kunlaboro en Eŭropo de 1975, estas nemalhavebla por la partopreno en vojaĝoj, por la harmonia evoluo de la turismo kaj por la individua kontentiĝo.
2. Ĉi-rilate, la rekomendoj pri plifaciligo, akceptitaj de la Konferenco de Unuiĝintaj Nacioj pri Internacia Vojaĝado kaj Turismo (Romo, 1963) signifas decidan stadion en la plifaciligo kaj daŭras servi kiel bazo por la estonta agado.
3. Koncerne internaciajn turismajn rilatojn, estas necese atente prikonsideri la socian kaj ekonomian situacion de ĉiu lando kaj la gravecon de respektado de iliaj nacia suvereneco, leĝoj kaj tradicioj sur la kampo de la turismo, kaj ankaŭ la rajtojn kaj devojn de iliaj civitanoj.

*Sekve de la supre menciitaj:*

Notas kontente, ke la Monda Turisma Organizo jam inkludis en sian ĝeneralan laborprogramon ekzamenon de la stato de la plifaciligo en la mondo kaj formulon de rekomendaj normoj kaj praktikoj ĉi-rilate;

Deziras, ke en siaj konsultiĝoj pri tiu ĉi temo la Monda Turisma Organizo povu dediĉi sian atenton interalie al:

a) la neceso de adekvata edukado, precipe pri turisma konscio, por ĉiuj oficialuloj, respondecantaj pri ĉelimaj formalajtoj;

b) la utileco de normigo de kartoj por en- kaj el-veturiliĝo kaj, finfine, ilia elimino pere de la enkonduko de novaj metodoj kolekti turismajn statistikojn;

c) la aplikado de la elektroniko por pasport-kontrolo kaj sekurecaj proceduroj;

d) manieroj akceli kaj simpligi la dogan-kontroladon;

Memorigas pri la paŝoj, faritaj dum la Internacia Turisma Jaro, proklamita en 1967 je la iniciato de la Internacia Unuiĝo de Oficialaj Vojaĝ-organizo; kaj tiurilate

Invitas la Ŝtatojn ekzameni la eblon reciproke aŭ unuflanke forigi la viz-postulon por maldaŭraj turismaj vizitoj;

Konsideras, ke la evoluigo de la turisma trafiko inter evoluantaj landoj postulas fleksebligon kaj liberaligon de la reguloj pri interŝanĝo-kontrolo en tiuj ĉi landoj.

Esprimas la opinion, ke la impostoj, kiuj — diference de la ĝenerala impostado — koncernas nur la turistojn, ofte malutilas al la turismo, krom se la enspezoj akiritaj tiamaniere estas senpere investotaj en la turisman sektoron aŭ por la antaŭenigo de la turismo;

Konsideras, ke la strebadoj flanke de la Monda Turisma Organizo estigi Turisman Kodon kaj Turisman Ĉarton celas antaŭenigi la komprenigon kaj kunlaboron inter ĉiuj nacioj kaj pli vaste evoluigi la turismon en ĉiuj rilatoj;

Deziras, ke la Monda Turisma Organizo ekzameni la eblon efektivigi rekomenditajn praktikojn koncerne medicinan helpon kaj la leĝan protektadon de la ekonomiaj interesoj de turistoj dum vojaĝoj, ĉu individuaj ĉu kolektivaj, ekster ilia hejmlando;

Petas la registarojn sin deteni apliki limigojn, formalajtojn aŭ aliajn malhelpojn al la eniro kaj eliro de la vojaĝantoj, kaj ankaŭ obstaklojn, fizikajn aŭ psikajn, al la vojaĝado de la turistoj de unu lando al la alia;

Alvokas la Ŝtatojn rekoni kaj respekti la rajton de la individuo, senkonsidere de religio, raso, kredoj aŭ loĝloko, viziti sian hejmlandon kaj fari ĉiujn necesajn paŝojn por plifaciligi lian liberan moviĝon kaj por garantii lian sekurecon;



**Petas** la **Statojn**, kiuj danke al unuflanka ago de aliaj **Statoj** profitis de plifaciligoj koncerne vizojn kaj aliajn vojaĝ-formalajojn, ekzameni la eblon por reciproki tiajn agojn;

**Petas** la **Statojn** por plifaciligi la turisman moviĝadon, ke ili efektivigu la dispoziciojn, enestantajn en la aktoj pri plifaciligado, eldonitaj de Unuiĝintaj Nacioj, la Internacia Civil-Aviada Organizo, la Interregistara Mara Konsultiĝa Organizo kaj la Dogan-Kunlabora Konsilio;

**Invitas** la **Mondan Turisman Organizon** fari ĉiujn eblajn paŝojn, pere de la ekzistantaj mekanismoj, por antaŭenigi la turismon.

## **TURISMA ĈARTO DE RAJTOJ KAJ TURISMA KODO**

La **Generala Asembleo de la Monda Turisma Organizo**, en sia sesa ĝenerala sesio, okazigita en Sofio (Popola Respubliko de Bulgario) de la 17a ĝis la 26a de septembro 1985:

**1. KONSCIE** pri la graveco de turismo en la vivo de la popoloj pro ĝiaj rekta kaj pozitivaj efikoj sur la sociaj, ekonomiaj, kulturaj kaj edukaj sektoroj de naciaj socioj kaj pri la kontribuo, kiun ĝi kapablas fari, laŭ la spirito de la Ĉarto de Unuiĝintaj Nacioj kaj la Manila Deklaracio pri Monda Turismo, por bonigi reciprokan interkompreniĝon, proksimigi la popolojn kaj sekve fortigi internacian kunlaboron,

**2. MEMORANTE** ke, kiel rekonita de la **Generala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj**, la **Monda Turisma Organizo** havas centran kaj decidan rolon en la evoluigo de turismo cele al la kontribuo, laŭ ĝia Artikolo 3, paragrafo 1 de ĝia Statuto "al ekonomia evoluigo, internacia kompreniĝo, paco, bonfarto kaj universala respekto kaj observo de la homaj rajtoj kaj fundamentaj liberecoj por ĉiu sen distingo laŭ raso, sekso, lingvo aŭ religio",

**3 MEMORANTE** la **Unuan Deklaracion pri Homaj Rajtoj** adoptita de la **Generala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj** la 10an de decembro 1948, kaj specife Artikolo 24, laŭ kiu "ĉiu havas la rajton je ripozo kaj libertempo, kiu implikas pravigeblan limigon de laborhoroj kaj periodajn salajratajn feriojn" kaj krome la **Internacian Konvencion pri Ekonomiaj, Sociaj kaj**

Kulturaj Rajtoj, adoptitan de la Ĝenerala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj la 16an de decembro 1966, kiu invitas ŝtatojn certigi por ĉiu "riponon, libertempon kaj pravigeblan limigon de laborhoroj kaj periodajn salajratajn feriojn, aldone al salajroj por publikaj ferioj."

4 KONSIDERANTE la rezolucion kaj rekomendojn akceptitajn de la Konferenco pri Internacia Vojaĝado kaj Turismo de Unuiĝintaj Nacioj (Romo, septembro 1983) kaj speciale tiujn celantajn la stimolon de turisma evoluigo en la diversaj landoj kaj la simpligon de registaraj formalajtoj rilate al internacia vojaĝado,

5. PRENANTE sian inspiron el la principoj detaligitaj en la Manila Deklaracio pri Monda Turismo adoptita de la Monda Turisma Konferenco la 10an de oktobro 1980, kiu emfazas la veran homan dimension de turismo, rekonas la novan rolon de turismo kiel taŭga instrumento por bonigi la kvaliton de la vivo de ĉiuj popoloj kaj kiel esenca forto por la paco kaj internacia kompreniĝo kaj kiu difinas la respondecon de ŝtatoj por evoluigi turismon inter la popoloj de la mondo kaj por protekti kaj ampleksigi la turismajn riĉaĵojn, kiuj formas parton de la heredaĵoj de la homaro, cele al kontribuo al la starigo de nova internacia ekonomia ordo,

6. SOLENE AFIRMANTE, kiel natura sekvo de la rajto je laboro, la fundamenta rajto de ĉiu, kiel jam sankciita de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj, je ripozo, libertempo, periodaj salajrataj ferioj uzebblaj por libertempaj celoj, je libera vojaĝebleco por edukaj kaj plezuraj celoj kaj je la rajto ĝui la avantaĝojn de turismo, kaj interne de sia loĝlando kaj ekster ĝi,

7 INVITAS la Ŝtatojn inspiriĝi el la principoj ĉi-sube detaligitaj, kiuj konsistigas la Turisman Ĉarton de Rajtoj kaj la Turisman Kodon, kaj apliki ilin konforme al la proceduroj preskribitaj en iliaj propraj leĝaroj kaj regularoj.

## TURISMA ĈARTO DE RAJTOJ

### Artikolo 1

1. La rajto de ĉiu je ripozo kaj libertempo, pravigebla limigo de laborhoroj, perioda salajrata forpermeso kaj senlima libereco de moviĝo, ene nur de la limoj de la leĝaro, estas universale rekonata.

2. La eluzo de ĉi tiu rajto konsistigas faktoron de socia ekvilibro kaj pliriĉiĝo de nacia kaj universala konsciigoj.

## Artikolo II

Kiel sekvo de ĉi tiu rajto, Ŝtatoj formulu kaj enkonduku politikon kiu celas stimuli la harmonian evoluigon de enlanda kaj internacia turismo kaj libertempaj aktivecoj por la bono de ĉiuj iliaj partoprenantoj.

## Artikolo III

Ci-cele, Ŝtatoj:

a) kuraĝigu la ordan kaj harmonian kreskon de kaj enlanda kaj internacia turismo;

b) integri sian turisman politikon kun siaj tegmentaj evoluigaj planoj ĉiunivele — loka, regione kaj internacie — kaj larĝigu turisman kunlaboron en kaj duflankaj kaj multflankaj kadroj, inkluzive tiun de Monda Turisma Organizo;

c) donu taŭgan atenton al la principoj de la Manila Deklaracio pri Monda Turismo kaj al la Dokumentoj de Acapulco "dum la formulado aŭ realigo de siaj turismaj planoj, programoj kaj gvidlinioj, laŭ siaj naciaj prioritatoj kaj enkadre de la laborprogramo de Monda Turisma Organizo."<sup>2</sup>;

<sup>2</sup> Rezolucio 38/146, akceptita de la Ĝenerala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj dum ĝia tridek oka sesio, la 19an de decembro 1983.

d) kuraĝigu la alprenon de manieroj por ebligi ĉiun partopreni en enlanda kaj internacia turismo, precipe per pli bona disdivido de labor-kaj libertempo, la starigo kaj bonigo de sistemoj de salajrata jara forpermeso, la malsamtempigo de feriaj datoj kaj per aparta atento al turismo por junuloj, maljunuloj kaj handikapuloj; kaj

e) por la bono de la nuna kaj estontaj generacioj, protekti la turisman medion, kiu, estante samtempe homa, natura, socia kaj kultura, formas la heredaĵon de la tuta homaro.

## Artikolo IV

La Ŝtatoj ankaŭ:

a) kuraĝigu por enlandaj kaj eksterlandaj turistoj la aliron al la heredaĵoj de la gasto-komunumoj per apliko de la provizoj de ekzistantaj faciligoj devenantaj de Unuiĝintaj Nacioj, Internacia Civil-Aviada Organizo, Internacia Mara Organizo, Dogana Kunlabora Konsilio aŭ ajna alia organizo, precipe la Monda Turisma Organizo, cele al kreskanta liberigo de vojaĝado;



- b) stimulu turisman konscion kaj faciligu kontakton inter vizitantoj kaj la gastigaj komunumoj cele al ilia reciproka interkompreniĝo kaj boniĝo;
- c) certigu la sekurecon de vizitantoj kaj iliaj posedaĵoj per preventaj kaj protektaj rimedoj;
- d) ofertu kiel eble plej bonajn kondiĉojn de higieno kaj aliron al sanservoj, aldone al la malhelpo de kontraŭaj malsanoj kaj akcidentoj;
- e) malhelpu ajnan eblecon por uzo de turismo en la ekspluatado de aliaj por prostituadaj celoj; kaj
- f) fortigu, por la protekto de turistoj kaj la popolo de la gastiga komunumo, rimedojn por malhelpi la kontraŭleĝan uzon de narkotikajoj.

#### Artikolo V

La Ŝtatoj devas laste:

- a) permesi al enlandaj kaj internaciaj turistoj moviĝi libere en la lando, tamen sen kontraŭagi tiujn limigajn preskribojn starigitajn en la nacia intereso ĉe difinitaj areoj de la teritorio;
- b) malpermesi ajnajn diskriminaciajn praktikojn kontraŭ turistoj;
- c) permesi al turistoj senprokrastan aliron al administraj kaj juraj servoj, al konsulejaj reprezentantoj kaj disponigi internajn kaj eksterlandajn publikajn komunikilojn; kaj
- d) kontribui al la informiĝo de turistoj cele al akcelado de kompreno de la kutimoj de la popoloj kiuj konsistigas la gastigantajn komunumojn en lokoj de travojaĝado kaj restado.

#### Artikolo VI

1. La popoloj, kiuj konsistigas la gastigajn komunumojn en lokoj de travojaĝado kaj restado rajtas je libera aliro al la propraj turismaj faciligoj, dume ili instigu respekton, per siaj sinteno kaj konduto, por siaj naturaj kaj kulturaj medioj.
2. Ili rajtas krome atendi de la turistoj komprenon kaj respekton por iliaj kutimoj, religioj kaj aliaj elementoj de iliaj kulturoj, kiuj formas parton de la homa heredaĵo.



3. Por faciligi tian komprenon kaj respekton, la disvastigo de taŭgaj informoj devas esti kuraĝigata pri:

a) la kutimoj de la gastigaj komunumoj, iliaj tradiciaj kaj religiaj praktikoj, lokaj tabuoj, sanktaj lokoj kaj sanktejoj, kiuj devas esti respektataj;

b) iliaj artismaj, arkeologiaj kaj kulturaj trezoroj, kiujn oni devas konservi kaj

c) sovaĝbestaj kaj aliaj protektendaj naturaj riĉaĵoj.

### Artikolo VII

La popoloj, kiuj konsistigas la gastigajn komunumojn en lokoj de travojaĝado kaj restado estu invitataj akcepti turistojn kun kiel eble plej multe da gastamo, afableco kaj respekto, necesaj por la evoluigo de harmoniaj homaj kaj sociaj rilatoj.

### Artikolo VIII

1. Profesiuloj en turismo kaj liverantoj de turismaj kaj vojaĝaj servoj povas kontribui pozitive al la turisma evoluo kaj la enkonduko de la postuloj de ĉi tiu Ĉarto de Rajtoj.

2. Ili submetiĝu al la principoj de ĉi tiu Ĉarto de Rajtoj kaj plenumu ĉiuspecajn devigojn, kiujn ili akceptis kadre de siaj profesiaj agadoj, por certigi la provizon de bonkvalitaj servoj por tiel emfazi la humanismajn ecojn de turismo.

3. Ili specife detenu sin de kuraĝigo de la uzo de turismo por ĉiuj formoj de ekspluatado de aliaj.

### Artikolo IX

Turismaj profesiuloj kaj liverantoj de turismaj kaj vojaĝaj servoj estu kuraĝigitaj per taŭga nacia kaj internacia leĝofarado, kaj disponu pri la necesaj faciligoj por:

a) plenumi siajn taskojn en favoraj kondiĉoj, liberaj de specifaj malhelpoj aŭ diskriminacio;

b) profiti de ĝeneralaj kaj teknikaj trejn-programoj, kaj enlandaj kaj eksterlandaj, por certigi la disponeblon de trejnitaj homfortoj; kaj

c) kunlabori inter si kaj kun la publikaj aŭtoritatoj, enkadre de naciaj kaj internaciaj organizoj, cele al plibonigo de la kunordigo de siaj agadoj kaj la kvalito de siaj servoj.

# TURISMA KODO

## Artikolo X

Turistoj celu, per sia konduto, kreskigi komprenon kaj amikajn rilatojn inter popoloj, kaj je nacia kaj je internacia niveloj, por tiel kontribui al daŭra paco.

## Artikolo XI

1. Ĉe lokoj de travojaĝado kaj restado turistoj respektu la establitajn politikajn, sociajn, moralajn kaj religiajn ordojn kaj obeu la leĝaron kaj regulojn validajn.

2. En ĉi tiuj lokoj turistoj ankaŭ:

a) montru kiel eble plej multan komprenon pri la kutimoj, kredoj kaj konduto de la gastigantaj komunumoj kaj la maksimuman respekton por iliaj natura kaj kultura heredaĵoj;

b) sin detenu de emfazado de la ekonomiaj, sociaj kaj kulturaj diferencoj inter si kaj la loka popolo;

c) estu akceptema al la kulturo de la gastigaj komunumoj, kiu estas integra parto de la komuna homa heredaĵo;

d) sin detenu de ekspluatado de aliaj por prostituadaj celoj;

e) sin detenu de komercado pri, portado kaj uzado de narkotaĵoj kaj/aŭ malpermesataj drogoj.

## Artikolo XII

Dum sia vojaĝado de unu lando al alia kaj ene de la gastiga lando turistoj devas povi, pro taŭgaj registaraj rimedoj, ĝui:

a) mildigon de administraj kaj financaj limigoj; kaj

b) kiel eble plej bonajn kondiĉojn de transporto kaj restado, kiujn kapablas oferti liverantoj de turismaj servoj.

## Artikolo XIII

1. Turistoj rajtu je libera aliro, kaj ene de kaj ekster siaj landoj, al terenoj kaj lokoj de turisma intereso kaj havu, ene de la limoj de ekzistantaj reguloj kaj leĝoj, liberan moviĝon en lokoj de travojaĝado kaj restado.



2. Je aliro al terenoj kaj lokoj de turisma intereso kaj dum siaj vojaĝado kaj restado, turistoj rajtu ĝui:

a) objektivajn, precizajn kaj kompletajn informojn pri kondiĉoj kaj faciligoj liverotaj dum siaj vojaĝado kaj restado fare de turismaj organizoj kaj liverantoj de turismaj servoj;

b) sekurecon por si mem kaj siaj posedaĵoj, kaj protekton de siaj rajtoj kiel konsumantoj;

c) adekvatan publikan higienon, precipe rilate al loĝigo, manĝigo kaj transportado, informadon pri la efika malhelpo de kontaĝiaj malsanoj kaj akcidentoj kaj senpera aliro al sanservoj;

d) aliron al rapidaj kaj efikaj publikaj komunikiloj, kaj enlandaj kaj eksterlandaj;

e) administrajn kaj jurajn procedurojn kaj garantiojn necesajn por la protekto de iliaj rajtoj; kaj

f) la praktikadon de siaj propraj religioj kaj la uzon de tiucelaj ekzistantaj faciligoj.

#### Artikolo XIV

Ciu rajtas komuniki siajn bezonojn al leĝaj reprezentantoj kaj publikaj aŭtoritatuloj, por povi eluzi sian rajton je ripozo kaj libertempo por ĝui la agrablaĵojn de turismo sub la plej favoraj kondiĉoj kaj, eventuale, ĝis la limigoj de la leĝaro, kunveni kun aliaj tiucele.

---

Eldonita de "Esperantotur" - Turisma Servo  
de "Monda Turismo" en Bydgoszcz, Pollando.

Kompostita en Hungario.  
Multobligita en la Poligrafia Centro de  
Pola Esperanto-Asocio en Bydgoszcz.